



Oficiala Organo
de

Flandra
Ligo
Esperantista



JARA ABONPREZO: 20 fr. — Eksterlando: 5 belgoj.

Por membroj de « Flandra Ligo Esperantista » senpaga.

Flandra Esperanto - Instituto

Vereeniging zonder Winstbejag
Magdalenastraat, 29, KORTRIJK

Postĉekkonto: F. E. I. 3268.51 — Telefono: 1654

EL LA PREZARO:

| | | |
|--|----------|-------|
| En okcidento nenio nova — Remarque. | Fr. 55,— | bind |
| Leono de Flandrujo — Conscience | 55,— | » |
| La Viro el Francujo — Ivans | 29,— | » |
| Per Balono al la Poluso — Andrée | 65,— | » |
| Riĉa kaj sen Mono — Oppenheim | 29,— | » |
| La Ora ŝtuparo — Oppenheim | 29,— | » |
| Ŝi — H. Rider Haggard | 29,— | » |
| Verdaj Donkiĥotoj — J. Baghy | 20,— | » |
| Tra la Labirinto de la Gramatiko | 45,— | » |
| Elektitaj Noveloj — Lode Baekelmans | 7,50 | broŝ. |
| Amo kaj Poezio — Jan Van Schoor | 10,— | » |
| La Du Amatinoj — de Musset | 7,50 | » |
| La Mono de S-ro Arne — Selma Lagerlöf | 12,— | » |
| Gösta Berling — S. Lagerlöf | 45,— | » |
| La Juna Vivo (1934-1935) | 15,— | » |
| Pallietier — F. Timmermans | 35,— | » |
| Barbro kaj Eriko — Letera romaneto | 4,— | » |
| Anni kaj Montmartre — R. Schwartz. | 18,— | » |
| Verdaj Donkiĥotoj — J. Baghy. | 18,— | » |
| Gaja Lernolibro (ilustrita) | 12,— | » |
| Examenopgaven | 12,— | » |
| Leerboek Dirksen — 2 deelen | 18,— | » |
| Blinda Rozo — H. Conscience | 4,— | » |
| Het Esperanto in 10 lessen — Witterijck | 5,— | » |
| Woordenboekje Blok (1890 stamwoorden) | 2,— | » |
| Schidlof Zakwoordenboek | 30,— | » |
| Flandra Esper. 2-a, 3-a, 4-a, 5-a kaj 6-a jarkolektoj | 15,— | » |
| Flandra Esperantisto, 1-a jarkolekto (sen la n ^o 1) | 10,— | » |

INSIGNOJ: Malgranda verda stelo: 2.00 fr.

Verda stelo, sur blanka fono: 2,50 fr.

Verda stelo, kun kruco: 2,50 fr.

Granda verda stelo, kun blanka rando: 4,50 fr.


Glumarkoj, en lingvo Flandra aŭ Esperanta: folio de 8 diversaj markoj kostas po 5,— fr. por 10 folioj.

Krajono kun surpriso « Esperanto »: 1,— fr.

Leterpapero kaj kovertoj por 20 po 3,— fr.

Poŝtkartoj: por 10 po 1 fr.

Flandra Esperantisto



Oficiala Organo de Flandra Ligo Esperantista
Aperas ĉiumonate

Ĉefredaktoro:
C. Schroeyers
Transvaalstraat, 10
Berchem
Antwerpen



Administranto:
Gerard Debrouwere
Magdalenastr. 29
Kortrijk
Tel.: 1654

Jara abonprezo: 20 frankoj. — Eksterlando: 5 belgoj
Por membroj de « Flandra Ligo Esperantista » senpaga.
Poŝtĉeko: 2321.50 de F. L. E. Kortrijk.


Konstantaj kunlaborantoj: L. CALLOENS, G. DEBROUWERE, L. v. d. POEL, E. CORTVRIENDT, H. VAN DURME kaj aliaj.

La kriza Pasko.

Kiam je la Paskofesto
Nin revenis de l'vojaĝo
La kantantaj sonoriloj
Super urbo kaj vilaĝo
Grandanime pluvis ovojn
Ruĝajn, bluajn, verdajn, flavajn;
Ĉokoladajn kaj sukerajn;
Grandajn, etajn, brilajn, ravajn...
Kaj la infanar' feliĉa
Kantis laŭte: « Halelujo! »
« Vivu papo! Vivu Romo! »
« Vivu tuta Italujo! »

Ankaŭ tiun Paskofeston
Aŭdis ni post la vojaĝo
Revenantajn sonorilojn
Super urbo kaj vilaĝo...
Sed eĉ ne plej eta ovo
Falis nun en la ĝardeno.
Ĉe patrin' infanoj plendis,
Koro plena de ĉagreno.
Sed patrin' filozofie
Tuj respondis sen surprizo:
« Sciu do, ke ĉe la pap' en
Romo ankaŭ estas... krizo! »

L. v. d. POEL.



7a Flandra Kongreso Gent

30an KAJ 31an DE MAJO KAJ 1an DE
JUNIO 1936.

Mendojn kaj mendojn oni bonvolu fari je P. C. 1530-50 je nomo de Ach. De Maertelaere, Proveniersterstraat, 25, Gent. Korespondojn por la organiza komitato oni sendu al la adreso : Raapstraat, 82, Gent.

SESA KOMUNIKO

Kotizo : Fr. 12.—.

Glumarkoj trikoloraj : po Fr. 6.— la 100.

Mallonga tempo restas ankoraŭ al la postrestantoj, kiuj ne jam sin enskribigis por la kongreso.

La O. K. konsilas tre baldaŭan aliĝon kaj sciigas, ke por la loĝado ankaŭ urĝas. La unuaj enskribintoj havas la plej bonajn lokojn laŭ la kategorio por kiu ili enskribis.

Al enskribintoj post la 15a de Majo ni ne plu certigos loĝadon. Koncerne la premion aljuĝotan al la plej granda grupo : je la momento de ensendo de tiu-ĉi komuniko, estas la grupo de Ronse kiu estas kandidato.

Kiu grupo provos ĝin forkapti ?

Nia kongreso estigas multan intereson en la eksterlando. Jam sin enskribigis gesamideanoj el Nederlando, Finnlando, Francujo kaj Germanujo.

POSTKONGRESA SEMAJNO

Nome de la Ostenda grupo ni havas la plezuron sciigi, ke ĝi volas organizi postkongresan semajnon.

Jen la provizora programo :

Lundon : Vespere : Akcepto de la kongresanoj.

Mardon, matene : Ekskurso al la nova fiŝhalo kaj-haveno.

Posttagmeze : Vizito al la Urbo.

Merkredon : Ekskurso al Ieperen kaj la batalkampo.

Ĵaŭdon : Ekskurso al Sluis (Nederlando) laŭ la marbanlokoj : Den Haan, Wenduyne, Blankenberghe, Zeebrugge, Knocke, De Sluis. Tra Brugge ree al Ostendo.

Vendredon : Vizito al la Urbdomo, Banpalaco, Kursalo, k. t. pl.

Sabaton : Ekskurso al Dunkerque (Francujo).

Samideano Snykers bonvole gvidos la postkongresanojn, kaj havigos plezure pliajn informojn al la interesuloj.

ALIĜU TUJ !!

Al Gent

KAREL LOD. LEDEGANCK

(Eecloo 1805 — Gent 1847)

Fragmento : strofoj 1, 2, 3, 4, 5, 16, 20, 22.


Ne restas plu
Al vi l'influ'
Iama, fiera urb', rompinta reĝajn volojn,
Ne plu al vi leonspirit',
Ne plu vi estas la civit'
Alparolanta kaplevite la popolojn ;
Ne plu de l'heroeco Flandra naskiĝlok'
Ne plu la centro de la lukso de l'epok'.

Via potenc'
De la komenc'
Jam longe estas for kun ĉia kuna brilo ;
Jam for kun la mirinda fort'
De memdispon' pri propra sort'.
Prosperkreat', de malprosper' plidolĝigilo ;
Jam for kun propra bel' kaj propra ec' kaj mort'
Samkiel ŝtat' de popol' ekstermita, for...

For estas tag'
De l' leonflag'
Flirtanta super la korporacio, gildo,
Buklantaj kiel soldatar'
Kirason en danĝero, ĉar
Justecon ili celis, venkis, laŭ ĉi bildo !
Atestu l' franca reĝ', burgunda la dukar',
Atestu l' Bruĝa kamp' kaj antaŭ Kluz' la mar' (1).

Kia jubil'
Naskiĝis fil'
Al vi, imperiestro, kiu l' mondon gvidis (2)
Forpasis temp' post kiam vi
— post longa, raŭka militkri' —
La sanktan Nederlandan repaciĝon vidis (3).
Ho mankas al patruj' iama infanar' !
Ĉu poreterne for heroa vi anar' ?

Ho ve, la fam',
Ĉi florornam'...
Neniam ĝi post la senfoliig' refloros,
Kaj post la ofta ŝtata vent',
Mordinta vin per akra dent',
Ĝi velke terenkuŝas kaj ne plu adoras...
Kaj konserviĝas nur el la antikva fam',
Nedifektita nomo kaj memora van'.



GENT. — *Flanka fasado de la Haloj kaj Belfrido*
 Dekstre : *Reĝa Flandra Urbteatro*

Sajnas de vi
 Infane pli
 Kaj pli kaprica, franca frivolec' amata
 Kun senskares' kaj nesincer',
 Kaj ŝajnplezur' kaj vestmanier',
 Degenerintaj moroj kaj petolo flata.
 Vi ŝajnas porti francan jugon kun fier',
 Kaj mokinsulti al nacia Karakter'.

Bel' de si mem...
 Ĉu diadem'
 Pli riĉa? Ĉu la roz' envias al rubenoj,
 Herbejo al rozeja rav',
 La blanka cigno al la pav',
 Arbarmonark' al ermenfelo kaj ordenoj?
 Ĉe Lej' kaj Skeldreĝin' neniam estu em'
 Al fremda ornamaĵ', pro ties membra prem'!

Tial, memor'
 Al sankta glor',
 Ĉirkaŭa iru. Al la pasintec' fidela,
 Vi restu flandra laŭ natur'!
 Laŭ koro, laŭ via kultur'!
 Kaj laŭ la lingvo kaj la moro altnivela!
 La famo kaj feliĉ' troviĝas en ĉi ag',
 Kun ĉia belegec' de la antaŭa tag'!

El la Flandra tradukis : TYNEVERUM.

(1) 2 Majo 1382 — batalo sur la kampo de Beverhout. Julio 1338 —
marbatalo antaŭ Kluzo (Sluis).

(2) Karolo V — 24 Februaro 1500.

(3) 8 Novembro 1576 subskribigis en la urbdomo la « Pacificatie van Gent », kiu finigis la religiajn militojn en la Nederlandoj.

(4) 1846. Jaro en kiu Ledeganck faris la poemon; kvankam malnova ĝi ankoraŭ nun estas aktuala.

Ivantje.

JULIO BAGHY
(Budapest)

Ivantje was een flinke boerenjongen,
van 't stille dorp een braaf-naieve zoon.
Zijn zorgelooze blauwe oogen zongen,
steeds opgeruimd zwoegd' hij voor karig loon.
Maar van de wereld had hij nooit geweten,
met vromen schroom ging hij het leven door,
en 's avonds op zijn stroobed neergezeten,
las hij zijn moeder uit den bijbel voor.

Toen kwamen wereldschokkend-wreede tijden...
't Gebulder van 't kanon, het Krijgsgeweld
dreef weg van huis en dompeld' hem in 't lijden,
en als verweesd bleef achter 't stroobed, 't veld...
Maar steeds gedacht hij vroom de laatste woorden
van zijne moeder zóó door hem vereerd :
« Ivantje lief, hem zal het zwaard vermoorden,
— zoo zegt de bijbel, — die het zwaard hanteert ».

Op 't slagveld was hij één en al verbazen...
Daar groeit geen graan, daar groeit slechts de granaat,
geen vogelzang weerklinkt, schrapnellen razen,
geen lustig lied, geklaag, gekerm en haat,
krampachtig kloeke handen er omknellen
geen ploegen, maar geweren, vreemd genot...
Een klacht komt uit Ivantje's hart opwellen :
« O neen, o neen, niet dat is 't werk van God... »

De bajonet, 't geweer werpt hij nu neder,
en zonder wapens staat hij in 't gelid,
bestormt de draadversperring en keert weder,
en gaat ter loopgraaf wapenloos en bidt.
Er volgen straffen van den Staf, bevelen...
Steeds schudt hij koppig 't hoofd en tart den spot,
zegt enkel : « wat het lot mij moog bedeele,
slechts tien geboden ken ik van mijn God... »


Het vonnis luidt : Verraad... De beulen wenken
en vijf soldaten sleepen hem vooruit...
Zijn laatste tocht doet hem aan Kristus denken,
aan wat de bijbelsch-kristen tucht beduidt...

Geen priester daar... Ruwhartige soldaten...
Een krekel kriecht in de ongestoorde rust...
Ivantje bidt : « God, wil mij niet verlaten... »
Met mild gemoed gaat hij als onbewust.

Ter strafplaats tast hij, wijl geweren klakken,
plots in zijn broodzak, reeds in 't zicht der dood...
Van wat zijn moeders trouwe hand gebakken
had ; bleef hem nog wat ongerepte brood.
Wat weegt het zwaar ! Weemoedig maar gelaten
streelt hij het zacht... Een traan ontwelt hem nu...
Verteederd reikt Ivantje het den soldaten :
« Neemt dit, mijn broeders, 't weze brood voor U... »

Naar het Esperanto : TYNEVERUM.

P. S. — Tiu-ĉi poemo povas esti represata, kondiĉe ke oni sendu 2 ekzemplerojn al nia Redakcio.



GENT. — Cefpreĝejo Sta Bavo. En ĝi troviĝas la fama pentraĵo de la fratoj Van Eyck : « La Adorado de la Dia Saĝido »

Sonetoj sonas...

Sonetoj sonas en la koro,
Resonas tra l' poeta mens'
Sed esprimadon de la pens'
Li serĉas vane, hor' post horo.

Dezir' deŝiras lin interne,
Forvelkas la spirita fort'
En malstreĉita harpokord'
Mordetas la ĉagreno verme.

Se lia nefidela Muz'
Pro lia plendo, post rifuz'
Nur unu fojon eĉ revenus,

Ja mil sonetojn, kun fervor',
Li verkus, kaj knabina kor'
Pro tiom da ekstaz' lin benus !

L. VAN DER POEL.

27-3-1935.

Nokta vizito

Jen estas nun la eta domo,
en kiu loĝas l' amatin'.
Aŭdiĝas dolĉe mia nomo.
Ĉu eble ŝi jam vokus min ?

Tra nigraj nuboj al ĉielo
aperas flava lunobril' ;
ĉe la fenestro de l' anĝelo,
fermita estas la kovril'.

De kie venis do l' alvoko ;
silento regas ĉirkaŭ mi ?
Ĉu estas nur kruela moko ;
ĉu forpasinta iluzi' ?

Malantaŭ nigra nubvalo
lumanta luno restas for ;
kaŝite, mia idealo
lumigas nun en mia kor' !

JUUL KARNAS

Diversaĵoj

Esperantista Hejmo estas starigita en Parizo, 34, rue de Chabrol,
apud la stacidomoj Norda kaj Orienta, apud la metro-stacioj Pois-

sonnière, Est kaj Nord. En « Franca Esperantisto », S.ro Petit konstanta sekretario de la Franca Asocio skribas ke ĝi ŝuldas tion « dank' al la malavareco de nia Prezidanto, S.ro Archdeacon, dank' al la taŭga agado de SFPE, dank' al regula progresado de nia membraro, de niaj federacioj kaj grupoj, de niaj enkasigoj ».

* * *

AL LA INTERNACIA INSTRUISTARO

Karaj gekolegoj,

Esperanto vivas ankoraŭ en Germanlando ! Tie ekzistas ankoraŭ — pri kiu vi ŝajne tute forgesis — la Interna Korespondo-Oficejo de IALA. Ĉi tiu oficejo peradas korespondadon inter geinstruistoj kaj gelernantoj de la tuta mondo. La perado estas senpaga. Do, kiam vi serĉas Esperanto-korespondadon, anoncu vin ĉe ni ! La anonco enhavu jenajn informojn : kompleta adreso, aĝo, speco de la lernejo en kiu vi instruas aŭ kiun la gelernantoj vizitas, nombro de la anonc-itaj knaboj kaj knabinoj, dezirataj temoj kaj interrilatoj, specialaj deziroj. Kiam mi ricevas sufiĉe da materialo, mi aperigos viajn anoncojn en apartaj korespondo-listoj. Ĉi tiuj listoj aperos kiel aldonoj al Internacia Pedagogia Revuo en marto, majo, julio, septembro kaj novembro de ĉi tiu jaro kaj tiamaniere estos disvastigataj en ĉiuj landoj.

La sekretariino : Marta MOELKE

Berlin-Steglitz, Hünensteig, 8-a, Germanujo.

* * *

La unuiĝo « *New History Society* » en New-York okazigos ĉi tiun jaron mondan konkurson pri la temo : « Kiel povas la popoloj de la mondo atingi la ĝeneralan senarmigadon ? »

La tuta loĝantaro de la terglobo povas partopreni ĝin kaj la donotaj premioj entute sumiĝas je 5.000 dolaroj.

Ĉiu, kiu interesiĝas pri ĉi tiu konkurso skribu Esperantlingve aŭ flandralingve al la nomita unuiĝo, kies adreso estas : 132, East 65th. street, New-York, U.S.A.

* * *

S.ro R. Chance en Reims, posedanto de granda vinberejo, nomigis la plej bonan kvaliton de sia ĉampano « Esperanto ».

* * *

En *Heroldo de Esperanto* de 15a de Marto 1936, ni legas ke la Esperanto-movado en Germanlando ĵus spertis gravan baton : la anstataŭanto de la Gvidanto, germanregna ministro Hess, malpermesis al ĉiuj membroj de la nacisocialista partio kaj de ĝiaj suborganizoj, esti samtempe membroj de iu artlingva organizajo. Tio devigas la prezidanton de Germana Esperanto-Asocio kaj multajn membrojn sindonajn al nia afero, ekŝiĝi ; ankaŭ UEA perdos grandan nombron de siaj delegitoj kaj membroj en Germanlando, kaj cetere ne la plej malbonajn.

La entrepreno de *Heroldo* translokiĝos al Nederlando, lasante en Kolonjo nur filion.

En la sama numero, ni legas publikan proponon de S.ro Jung al la estraro de UEA por ke ĝi akceptu *Heroldo*-n kiel oficialan organon.

* * *

En Danlando la propagando en la lastaj jaroj estis tre efika kaj la cirkonstancoj nun estas tre favoraj. Kelkaj agemuloj volas labori grandskale kaj atingi la radion. Tion ili esperas pere de propagando en la taggazeto « Politiken » el Kopenhago, kiu havas eldonnombro de 144.000 ekzempleroj.

Necesas granda atako de el eksterlando ; tial la samideanoj estas petataj skribi amase al suprenomita gazeto, ke ili deziras aŭdi per la radio en Esperanto pri la dana kulturo, literaturo, agrikulturo, pri Danlando kiel turistlando, k. t. p.

Kiu kunlaboras ?

La 17an de novembro 1927 fondiĝis « Het Vlaamsche Kruis » kiel asocio sen profita celo.

La celo de la asocio estas fiksita en la statuto, publikigita en la Statjurnalo de la 17a de novembro 1927.

La celo de la asocio estas, je ĉiu maniero, plialtigi la higienon, la bandaĝ- kaj flegscion, la proksimumon kaj la humanecon, en kelkaj vortoj, prizorgi la socialajn, medicinajn, higienajn kaj moralajn interesojn de la flandra popolo kaj disvastigi la ideojn de tio. Het Vlaamsche Kruis iĝos por la flandra lando la centralo por popolsano. Ĝi volas servi la loĝantaron sen unu kaŝita intenco, volas precipe esti pactasko.

Malgraŭ la fakto ke « Het Vlaamsche Kruis » fondiĝis dum la krizperiodo, ĝi jam montris multajn rezultatojn de intensa laboro.

La legantoj certe memoros la helpdonon dum la diversaj subakvigoj en nia lando. Centmiloj da frankoj estis donitaj en naturo kaj mono kiel subteno, rekte al la suferantoj. La pilgrimantoj al la Izermonumento en Diksmuide jam vidis la laboron de la diversaj helpservoj. Sed tiu-ĉi helpdonado postulas organizon kaj instruon.

Het Vlaamsche Kruis provos penetri en ĉiu komunumo de Flandrujo. Tial provos la ĝenerala sekretario trovi en ĉiu komunumo konfidindan personon, kiu iĝos la akso kaj kerno de la fondota sekcio. La tasko de la deputito ekzistas en la varbo de membroj, la plifaciligado de la agadoj de la asocio en lia ĉirkaŭaĵo, informadoj pri la situacio en lia loko, k. t. p.

Mi estas certa ke la Flandremuloj, kiuj la lastajn jarojn montris fian laborforton, energion kaj sindonemon, ankaŭ kunlaboros en tiu-ĉi socia, higiena afero por plifortigi asocion kiu aranĝas sian laboron por la feliĉo kaj prospero de la Flandra loĝantaro.

Kiu do kunlaboros ?

J. VANDERSTEEN,
E.H.B.O. Kring, Antwerpen.

Alvoko

al la katolika junularo esperantista de la tuta mondo.

Dum la tagoj de la 24a-29a Aŭgusto ni kunvenos en Brugge (Flandrujo). La kompletan programon ni pli malfrue sciigos. Por la skoltoj ĝi estos tute interesa, ĉar estas S.ro J. Elias el Haarlem kiu prenos sur sin la gvidadon. Sed ankaŭ la neskoltojn ni atendas. Diversajn ludojn ni organizos i. a. piedpilkkonkursojn.

Ankaŭ estos studa parto. Ni klopodos efektiviĝi dum tiuj tagoj la kompletan reorganizon de nia junulara Katolika Esperantista movado. Pri tio ni ankoraŭ pli informos vin. Ĉefuloj de I.K.U.E. estas en la honorkomitato : S.ro Heilker, Frato Wigbertus Van Zon, Dr Wilhelm Solzbacher de la Moka.

Jen estas la unua komunikilo. En la sekvontaj numeroj aperos aliaj. Tuj anoncigu vin al ni.

Atenton, atenton ! La tagon antaŭ la niaj (t. e. la 23an de Aŭg.) okazos en Diksmuiden la famkonata Flandra Izerpilgrimado. Profitu tiun okazon kaj zorgu ke vi jam estu en Brugge por ke ni kune povu iri tien. Ĝi estas manifestacio por la tutmonda paco. La vesperon antaŭ tiu tago en kunveno kiun ni aranĝos por vi, ni parolos pri la « signifo de la Izerpilgrimado ».

J. Elias, Schotersingel, 61, Haarlem (Nederlando).

Fernand Roose, Guido Gezellelaan, 15, Brugge (Flandrujo) Belgio).

Leo Bruggeman, 81, Annonciadenstr., Brugge, Flandrujo (Belgio).

Peto

Cu iu samideano povas havigi al mi « Histoire de Langue Universelle », par L. Couturat et L. Léau, Paris, Hachette, 1903, 576 p.

Al tiu-ĉi verko aperis sekvo de la samaj aŭtoroj.

Ankaŭ mi volus broŝuron de L. Couturat « *Pour la langue internationale* », 16°, 1901.

Tiuj kiuj povas helpi min, skribu al mi pri la kondiĉoj.

Fernand ROOSE, Guido Gezellelaan, 15, BRUGGE

La katolika eklezio kaj la Estonta milito !

En la Usona Jezuita gazeto « The Month » aperis suprenomita artikolo pri kiu ni donos resumon ĉi-tie. La teksto estis skribita de la pastro Joseph Kaeting.

La evidenta malkapableco de la registaroj por fordeturni de la popoloj la minacantan militon kaj la militpreparon, kies ŝarĝoj similas al memmortigo, ekpruvas, ke, ĉu iliaj principoj, ĉu iliaj metodoj, aŭ eble ambaŭ estas malbonaj. Ĉar ni ne dubas pri ilia sincera deziro liberigi sin de ĉi tiu premo. Krom kelkaj frenezuloj kaj malbonfarantoj, kiuj plivigligas la militfantomon por vendadi siajn varojn pli multekoste, neniŭ homo saĝa povas kredi serioze, ke milito kaj militbruo estus bonfaro por la homaro aŭ povus helpi al la solvo de internaciaj konfliktoj.

Oni povas konsenti, ke hodiaŭ la mondo estas unuo de arto kaj scienco, de esploro kaj literaturo, de la higieno kaj trafiko. Nur la naciismo en malbona senco malhelpas la praktikon ellaboriĝon de ĉi tiu unuo sur ekonomia teritorio. La disvolviĝo de la mondkonscienco devas progresi malrapide. La nuna mondo estas loĝata tiel dense, la interesoj estas ligitaj tiel intime ke la persisto por justaj postuloj pere de milito signifas nenion alian ol serĉi justecon je la malprofito de la amo.

Sajnas ke la tempo alproksimiĝas dum kiu la Eklezio devos klarigi ne, ke la milito en si mem estas malbona, (ĝi ne povus fari tion, neforlasante sian firman dogmon kaj samtempe sian neerarecon) sed ke ankaŭ estas malaperintaj la plej lastaj fundaĵoj por la justigo de justa milito, pro ĉi tiu kaŭzo : ke, la akompanantaj fenomenoj kaj la rezultatoj de moderna milito estas la plej granda malprofito por la tuta homaro kaj la profito eĉ por la venkanto estas ekstreme duba ; cetere, ke multaj internaciaj institucioj disponas pri rimedoj por solvi konfliktojn laŭ pacama vojo ; kaj fine, ke ĉiuj popoloj de la mondo estas devigataj malebligi la militon per solena klarigo.

Kiam tio estos okazinta, neniu katoliko estos ankaraŭ kapabla batali aŭ soldatservi, krom en la nacia policaro, kiu estas necesa por subpremi enlandan agitigon aŭ por subteni internacian agadon kontraŭ maljusta atakanto.

La nuna situacio deziras pli ol kunvenojn de pacasocioj aŭ studgrupoj. *Tio kio estas necese antaŭ ĉio estas : 1° mobilizi la publikan opinion de la katolika mondo, kaj 2e klara kaj taŭga klarigo de la flanko de la eklezia hierarkio* el diversaj landoj pri la esencaj principoj de la kristana paco. Kiam do la naciaj episkopaj kunvenoj kaj fine la episkoparo de la tuta mondo publikigus mallongan raporton, pri la eklezia dogmo, koncerne la pacon (kun aldono de la plej gravaj eraraĵoj) tiam estus eble en la katolika mondo efektiviĝi pri ĉi-tiu temo, fortan kaj harmonian konvinkon.

« *Onze Vaan* », Junio 1935.

Tradukis : JEVA.

Flandra rakonto

Bastonbatoj kiel Rekompenco.

Estis iam fiŝisto kiu faris miraklan kaptajon. Fiŝante li kaptis grandegan ezokon, kiun li metis en duonsekan foson.

Tom poste, fuĝanta leporo saltis en la foson kie la ezoko agoniis, kaj, subite, dum sia malesperiga baraktado, la fiŝo mordis la vosteton de la leporo. Tiamaniere la kaptita ezoko siavice kaptis la leporon. Kiam la fiŝisto vidis tiun miraklon, li tufkore ekridegis kaj decidis donaci tiun strangan kaptajon al la imperiestro.

La pordisto de la imperiestra palaco nur permesis la eniron kondiĉe ke li poste ricevu la duonon de la rekompenco. Kontraŭvole la fiŝisto devis konsenti en tiu postulo de la malhonesta pordisto.

La imperiestro tre ĝojis pro la eksterordinara kaptajo kaj petis al la donacanto kian rekompencan li deziras.

— « Dudek bastonbatojn, se plaĉas al via moŝto », diris la viro. La imperiestro komence ne volis plenumi tiun strangan peton, sed, ĉar la fiŝisto insistis, li fine alportigis bastonon. Tiam la malica fiŝisto diris : « Donu la dek unuajn al la pordisto, li ja postulis la duonon de mia rekompenco. »

La imperiestro komprenis kio okazis kaj vekis gvardiiston, kiu, kun lerta mano, dekfoje maldelikate karesis la dorson de la avidema pordisto.

— « Sajnas al mi ke ili bongustas », ŝercis la fiŝisto, kaj, sin direktante al la gvardiisto : « Donu al li la dek ceterajn, mi kun plezuro rezignas mian parton. » Rerakontis : E. Cortvriendt.

La riceco de nia Nederlanda lingvo.

Profesoro J. Verdam taksas je 90.000 vortoj, la vorttrezoron de la Nederlanda lingvo. Estas memkompreneble, ke ne ĉiu persono bezonas la saman nombron da vortoj. Iu lingvokompetentulo kalkulis, ke la angla terkulturisto havas vortprovizon de nur 300 vortoj kaj ke bonedukita kaj studojn farinta Anglo, jam havas sufiĉe je inter 3.000 kaj 4.000 vortoj. Supozante ke la vorttrezoro de la plej instruitaj kaj plej elokventaj pensantoj de la homaro atingus 10.000, tiuokaze bezonus la plej intelekta Flandro nur naŭonon de la tuta vorttrezoro. La eminenta Milton uzis por siaj verkoj 8.000 vortojn kaj Shakespeare, — kiu pli ol iu ajn verkisto alportis diversecon en la esprimado de siaj ideoj, — ne uzis pli ol 15.000 vortojn.

Do, en la nuna momento, ne ekzistas timo, ke la lingvo ne sufiĉus por nia spirita disvolviĝo kaj ni ankaŭ ne timu, ke ĝi ne povos sekvi nian rapidegan progreson.

Ni scias, ke la nombro de la vortoj ĉiutage pligrandigas, pro tio ke la uzata lingvo mem pliriĉigas je novaj ideoj, por kiuj oni bezonas novajn vortojn kaŭze de la civilizado, progreso, prospero kaj la ĉiam pli kaj pli disvolviĝantaj artoj kaj sciencoj. Vere, oni havas la plenan rajton paroli pri la vortriĉeco de nia lingvo, kaj admiri la lingvon, kiu scipovas plenumi sian rolon en ĉiuj novaj necesecoj kaj kiu ankaŭ fidele helpadas kaj servadas al arto kaj scienco, eĉ en iliaj plej altaj progresoj.

Laŭ J. VERDAM.

(*Historio de la Nederlanda Lingvo*).

Nekrologo

La 19an de Februaro mortis S.ro A. VERHEYDEN, patro de nia agema kaj simpatia membro Edgard Verheyden.

Li estis bonege konata en la Flandrema movado en Antwerpen kaj estis ĉiam preta por helpi tie, kie helpo estis necesa.

Li repozu en paco.

Ni prezentas al la funebranta familio, niajn plej sincerajn kondolencojn.

Bibliografio

(Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias. Verkoj, senditaj al aliaj adresoj ol Redakcio, Administranto aŭ Flandra Esperanto-Instituto estos ignorataj.)

Ilustrita Lernolibro de Esperanto por Praktika Komencu Kurso, de Delfi Dalmaŭ, Lingva Komitatano, Metodo « Didakta ». — Prezo 1 ekz. 1 angla ŝilingo, 30 ekz. £ 1.—. Mendon kaj monon oni sendu al la aŭtoro, Apart. 5081, Barcelona.

Kun ĝojo ni salutas tiun-ĉi novan lernolibron kiu, malgraŭ ĝia broŝurformo enhavas dudek-du interesplenajn lecionojn. Kompreneble ĝi estas nur por komencantoj kaj tre prave nur instruas la aĵojn el la ĉiutaga vivo.

Ĉiun lecionon akompanas tre klara desegnaĵo kiu ege helpos la

lernantojn al bona kompreno kaj... rememorigo. Eĉ la unua desegnaĵo estas multkolora por la instruo de la fundamentaj koloroj.

La lecionoj konsistas el priskribo de la desegnaĵo kaj enhavas la novajn vortojn, prilaboritaj en belaj simplaj frazoj. Poste venas demando pri la instruitaj vortoj. Tiamaniere la lernantoj nur aŭdas parolas kaj legas Esperantajn vortojn. Vivu la « rekta » metodo, kiu ne tradukas naciajn ideojn ! Ni tre rekomendas tiun-ĉi novan lernigon, kaj ni esprimas nur unu deziron : ke ĝi estu sekvata baldaŭ de dua parto, por perfektiga kurso.

« *Vader kent z'n fransch* », de Nella Boom. — Nederlandlingva komedieto eldonita de la Int. Cseh-Instituto de Esperanto. 33 folioj, formato 22 × 29 cm. Prezo 0,75 gd. Temas pri la utileco de Esperanto por la internaciaj interrilatoj, kaj estas reprezentbla de 7 personoj. Ĉiu grupo certe metas ĝin en la programo por varb-vesperoj.

Kudlago, la malgranda eskimo. De N. van Hichtum. — El la nederlanda lingvo tradukis S. D. Mannoury. Eld. Soc. Esperanto, Stockholm. 40 paĝ. Prezo 0,75 sved. kr.

Jen libreto por novuloj kaj junuloj, kiun ili kun ĝojo kaj utilo legos. La simpla, reala rakonto pri la simpatia eskima bubo Kudlago vekos nian simpatian por li kaj lia popolo. La leganto ekscias multon pri la vivado kaj moroj ĉe la eskimoj, ni vidas kiel Kudlago ĉasas fokojn kaj ursojn, kiel li kaj lia patro konstruas beoton kaj sledon, kiel ili batalas kontraŭ neĝo kaj glacio, frosto kaj ŝtormo, sed ankaŭ kiel ili kun siaj najbaroj ĝojas kaj festas.

Tamen — brile la verkisto pentras la amon kiun havas la eskimoj al sia, laŭ nia opinio malagrabla, lando. Kudlago ne volas forlasi ĝin por veturo al pli sudaj landoj, ĉar li ne volas malhavi la ĝojon, kiun donas al li ĉasado, aŭ la frandaĵon, kiun reprezentas la graso de ĵus kaptita foko.

La lingvaĵo estas glata, kaj oni plene povas rekomendi la libron al komencantoj kiel ankaŭ al pli lertaj esperantistoj, kiuj deziras sin distri per legado de interesa rakonto.

La kovrilo prezentas tutpaĝan originalan bildon de la malgranda Kudlago kaptanta fiŝojn.

Grupa Vivo

ANTWERPEN : FLADREMA GRUPO ESPERANTISTA.

Dum la pasinta monato, niaj kunvenoj estis sufiĉe multnombre ĉeestataj. Ni multe priparolis kaj pridiskutis la starigon de komitato, kiu havos kiel celon, propagandi Esperanton en Antverpeno kaj ĉirkaŭaĵo ; kaj plibonigi la rilatojn inter la disigitaj grupoj : unuvorte : kunlabori al la interna ideo de Esperanto. Ni vere ĝojas, antaŭvidante la bonan rezultaton, kiun tiu komitato povus atingi. Antaŭ kelkaj tagoj, kelkaj membroj vizitis kune la ekspozicion « De Mensch ». Ĉiuj estis kontentaj kaj admiris la interesajn aparatojn, bildojn, ktp. Ke tiuj, kiuj ne jam vizitis « De Mensch », rapidu !

BRUGGE : KATOLIKA JUNULARA ESPERANTO GRUPO.

Jen post tre longa silentado venas nova kroniko por sciigi al la

Flandra Esperantistaro kiel nia movado fartas en Brugge. La somero estis forpasinta kaj ni denove devis pensi al nia grupo. Kiel ni ĝin vivtenos, kiel ni ĝin donos varbokapablecon, eble kiel ni ĝin plivigliĝos. Ĉar jes, ni havas penan ekzistadon. Ni havis valorajn membrojn sed multaj pro iu aŭ alia kialo devis forlasi nian klubon. Kiel ni povos allogi novajn junulojn kaj kiel ni povos teni ilin. Sub tia atmosfero ni kunvenis sabaton la 2an de novembro. Tiam ni longe kaj tre profunde diskutis, dum kio kamarado Rogier Hermans havis la okazon plene detale malkovri antaŭ niaj okuloj la animstato de la hodiaŭa junularo. La konkludo estis ke ni devis doni pli multan tempon al la agrabla parto de niaj kunvenoj kaj pli multajn ludojn. Dum la tuta sekvanta semajno, la membroj pli-, malpli, varbis, kaj la postan sabaton ni havis la enkondukan kunvenon kun parolado pri la problemo de la mondlingvo. Poste komencis la lecionoj kiuj ankaŭ estis tute alimaniere aranĝataj. Dum la du antaŭaj jaroj la lernantoj plendis pro tro da laboro, ni donis nun la samajn grandajn taskojn sed ni donis pli da tempo por fari ilin.

Ankaŭ lernolibro ne plu estas deviga. La taskojn kun vortaro multkopiis nia neniam sufiĉe laŭdinda smiko Leo Bruggeman. Poste ni tamen uzis la libron Swagers por fari ekzercojn. Ni devis ŝpari ĉar la lukostoj de nia kunvenejo estas plialtigitaj ! Ĉu nun ne estas vere ke nur unu faktoro gravas en la vivo : la mono, ĉu ne, Rogier Hermans ? Vi kiu promenadas kun la kapo en la nuboj sed kiu falos eble en puto. Kaj spite de tiu plialtigo, kiom da fojoj ni nun ne devis enordigi la salonon ? La jaroj sinsekvas sed ne similas. Pasintan jaron ni havis membron kiu, filozofe klera, alte tenis, pli alten portis la intelektan nivelon de nia grupo.

Ĉar li forloĝis li ne plu povas veni. Kaj nun alia elstaranta junulo subite eniris niajn rangojn. Mi povas diri ke li jam iĝis kolono de nia grupo : Kamarado Raymond De Smedt. Kun li eniras la gajeco ĉe ni. Ĉiusemajne oni senpacience atendas lian agrablan ofte sarkasman raporton. Ankaŭ li sin turnas malpli al la filozofio sed pli al la literaturo ! Li prizorgas la literaturan parton en niaj kunvenoj. Jam okazis la jara parolado por la novuloj pri la diversaj sistemoj de mondlingvo. Baldaŭ estos alia pri la vivo de Zamenhoff. Kaj poste, mi povas anonci paroladon pri la origino de nia urbo Brugge. Kun multa timo ni pripensis kiel ni farus por lerni kantojn ĉar nia bonega kantisto ankaŭ ne plu venos. Sed Eugeen Lully, Pierre Maes kaj De Smedt pruvis esti bonaj kantistoj. Ni subite malkovris tion dum tiu memorinda 29a de Februaro kiam ni kantis « Esperanta trinkkanto ». La kanta fajro neatendite eniris niajn membrojn. Kamarado Georges Verbruggen pli kapablas ludi piedpilkon. Almenaŭ ni supozas, ĉar ĝis nun ni ne jam aŭdis lian voĉon en kanta vibrado. Jam la tagoj plilongiĝas ; ni de tempo al tempo pensos pri la somero. Ni havas planojn : bicikle vojaĝi tra Flandrujo, tendumi, viziti grupojn, k. t. p. Sed unue, ancorau labori ! labori por perfektigi en la lingvo, por la proksima Cseh-kurso, por la junulaj tagoj 24-29 Aŭg.

Halo ! ni restu kune ligitaj per ligilo de profunda amikeco. Ni eduku unu la alian, ni laboru ! Venu, miaj amikoj, estos ĉiam kaj ĉie io bona farebla.

BRUSSEL : N. E. L. E.

Okaze de la lasta leciono de nia Cseh-kurso, nia grupo organizas festeton en kiu partoprenos ankaŭ la kursanoj de Vilvoorde. La festeto okazos Merkredon la 8-an de aprilo en la etaĝa saloneto de nia ejo. Sur la programo estas i. a. : paroladeto de la liga prezidanto, tombolo kaj dancado. Niaj anoj tie havos la okazon en plej agrabla maniero interkonatigi kun la novaj samideanoj.

Nia grupo prenis la gravan decidon ŝanĝi la tagon de niaj semajnaj kunvenoj ; estonte N. E. L. E. kunvenos ĈIUJAŬDE de la 20-a ĝis la 22-a.

Programo de niaj semajnaj kunvenoj dum aprilo :

Jaŭdon la 2-an : Perfektigaj ekzercoj.

Jaŭdon la 9-an : Pro nia kursfina festeto la grupo escepte ne kunvenas.

Jaŭdon la 16-an : Distriga vespero.

Jaŭdon la 23-an : Legvespero.

Jaŭdon la 30-an : Tradukekzercoj.

OOSTENDE : OSTENDA GRUPO ESPERANTISTA.

Malgraŭ nia decido, atendi ĝisvintre por aranĝi Cseh-kurson en diversaj urboj laŭlonge de la marbordo, S.roj Rainson kaj Ornstein tamen opinias ke ankaŭ je Pasko la kursoj ankoraŭ sukcesos. Vole nevole, niaflanke, ili mem organizos la kurson je la komenco de Aprilo. Malgraŭ ke la bansezono je tiu dato jam komencas, ili ne dubas sukcese. Por verdiri ni tamen iomete dubas pri la granda sukceso de ilia entrepreno kaj atendos kun kuriozeco la rezultaton. Volontege ni helpas al la antaŭpreparoj kiuj preskaŭ finiĝas.

« De Badgast » (V. T. B. por la marboro) enpresis Esp. artikolon pri Ostendo, kaj verŝajne daŭrigos Esp. rubrikon, se ĝi estas ŝatata de la Esperantistoj. Samideanoj kiuj konas aŭ legas « Badgast » eble povas certigi la eldoniston pri sia kontenteco por ke li daŭrigu la rubrikon.

RONSE : LA PACA STELO.

Aprilo estas por la Geronsanoj ĉiam interesa monato ĉar en tiu monato la kursoj finiĝas kaj ĉiam oni atendas novajn adeptojn en nia semajna medio.

Ankaŭ la ekskursoj komencas en tiu monato kiam la horo somera aperas. Ni diskonigos la unuan ekskurson je tempo kaj atendas ankaŭ grandan nombron da gepartoprenontoj ĉar fidela al la proverbo « Bona komenco... »

La prezidanto klopodas por veni al nia 7a kun interesa karavano da gajuloj (kiel decas kompreneble !).

Laŭeble la estraro komunikos la estontajn ekskursojn je fiksjaj datoj, kun tiu espero, ke eble aliaj grupoj povus eventuale kunpartopreni.

Ni faras lastan specialan alvokon por ĉeesti la kantvesperojn ĉar dum la ekskursoj ni ne bezonas ploremlajn vizaĝojn sed kontraŭe, brilantajn gajulojn kaj kantemajn korojn.

Ĝis en Majo kun aliaj novaĵoj.

La angulo de la sercemuloj

Al la ensendinto de la plej bonaj solvoj, ni promesas belan premion. Ĉiu solvita vorto valoras por 1 poento. Le premio estos do por tiu, kiu akiros la plej altan nombron da trovitaj vortoj.

La solvoj estu ensendataj antaŭ la 5a de Majo rekte al S.ro F. Volders — Bredastraat 94 — Antwerpen. Bonan ŝancon!

SOLVO DE PROBLEMO 2 (Februaro)

HORIZONTALE :

1. Ath — Dma — 2. Brod' — tram' — 3. Supra — arane' — 4. Flandra Ligo — 5. A. P. — oka — ni — 6. Or' — ok — 7. Akrig' — 8. An' — R. I. — 9. As — ole' — mi. — 10. Esperantist' — 11. Intim' — Atlas' — 12. Surd' — iama — 13. Tio — mon'.

VERTIKALE :

1. Abs — ist' — 2. Truf' — enui — 3. Hopla — astro. — 4. Drapo — aspid' — 5. An' — ran' — em' — 6. DO — or' — 7. Barkarolado — 8. AA — en — 9. Al — ogr' — T.A. — 10. Trink' — imiti — 11. Dragi — islam' — 12. Mano — tamo — 13. Ame — san'.

La feliĉaj gajnintoj de la premio por la bona solvo de problemo 2 estas So Fern. Roose, el Brugge, kaj S.ro J. Van den Bosch, el Eindhoven (Ned.).

La premioj estos alsendataj al la gajnintoj post kelkaj tagoj.

PROBLEMO 4

Intermiksi la literojn de ĉiu vortparo kaj aldonu al ĝi unu literon por formi novajn vortojn. La tiel aldonitaj literoj nomas vigan Esperantistan Grupon.

Ekzemplo : Rus + ulo + F = Sulfuro.

Rus — ulo
Reno — ant
Fi — limo
Alfo — el
Van' — io
Amo — ek
Ski' — not'
Aer' — do
Kol' — mir'
Rat' — ano
Tag' — ano
Laŭt' — ano
Rod' — ano
Tiam — ano
Son — ar'
Eto — ar'
Ilo — ar'
Ano — ar'

(sekvo.)

Tie — aro
Lenso — ar'
Emo — ar'
Rato — ar'
Ton' — ar'
Tio — ar'
Si — ar'
Kot' — ar'

PROBLEMO 5

Prenu el ĉiu vorto, du sinsekvajn literojn kaj vi legos gravan okazontajon kiu okazos en 1936.

Ekzemplo : Flamando = La.

Flamando
Konsenti
Pasamento
Influenco
Esperantisto
Flandrema
Aerometro
Esperanto
Aerolito
Ansero
Fotografajo
Melankolio
Angulo
Enirejo
Elzaso
Mokanto
Okazo
Ostaro
Enigmo
Digesto
Akuzanto

FLANDRA LIGO ESPERANTISTA **(Vlaamsche Esperantisten - Bond)**

Voorzitter: H. Rainson, Hombeeksche steenweg, 54, Mechelen.
Ondervoorzitter: E. Cortvriendt, P. Van Humbeekstraat, 3, Brussel-West.
Sekretaris: Gerard Debrouwere, Magdalenstraat, 29, Kortrijk.
Penningmeester: Bernard Bassleer, St. Rochuslaan, 93, Kortrijk.
Propaganda: Gerard Lenaers, Willemstraat, Hamme.
Postcheck: Flandra Ligo Esperantista, Kortrijk, nr. 2321.50.
Orgaan: « Flandra Esperantisto », maandblad.
Lidmaatschap (met maandblad): 20 fr. per jaar.

Aangesloten groepen:

- Aalst:** « Pioniro », lokaal: « De Koornbloem », Groote Markt; vergaderingen elken Woensdag avond.
- Aarschot:** « La Progreso », lokaal « Vlaamsch Huis », Deertschestraat; vergaderingen elken Zaterdag avond.
- Antwerpen:** « Flandrema Grupo Esperantista », lokaal « De Nieuwe Carnot », Carnotstraat, 70, vergaderingen elken Woensdag avond.
« La Rekta Vojo »; lokaal « De Gulden Kroon », St. Jacobsmarkt, 98; vergaderingen Donderdags om de 14 dagen.
- Brugge:** « Katolika Junulara Esperanto Grupo », Guido Gezellelaan, 15.
- Brussei:** « Nia estas la Estonteco » (N.E.L.E.); lokaal « Breughel », Em. Jacquemainlaan, 37; vergaderingen elken Donderdag avond.
- Edegem:** « Nia Idealo », Verbindingstraat, 9.
- Hamme:** « Juna Flandrujo »; lokaal « Jong Vlaanderen », Kapelstraat, 5; vergaderingen elken Woensdag avond.
- Kortrijk:** « Esperantista Grupo »; lokaal « In den Tuin », IJzerweglaan, 5; vergaderingen elken Woensdag avond.
- Lede:** « La Esperanta Stelo »; sekretariaat: Krommenellenboog, 60. Lede.
- Leuven:** « Nova Tagiĝo »; sekretariaat: Tienschestraat, 106.
- Lichtervelde:** Sekretariaat, Weststraat, 47.
- Mechelen:** « La Estonto », vergadering elken Vrijdag te 20 uur, Hombeeksche steenweg, 54.
- Oostende:** « Esperantista Grupo »; sekretariaat: Lijndraaiersstraat, 48.
- Oudenaarde:** « Al Paco »; sekretariaat: Nederstraat, 8.
- Roeselare:** « Ruselara Grupo Esperantista »; Statedreef, 177.
- St. Niklaas:** « Al Triumfo »; sekretariaat: Wegvoeringstraat, 73.

Alle inlichtingen verstrekken verder te:

- Diksmuide:** M. Maelberg, Wilgenwijk, 28.
- Gent:** Juliette Terrijn, Raapstraat, 82.
- Harelbeke:** A. Doornaert, Stasegemstraat.
- Hoboken:** J. de Groot Caronstraat, 31.
- Meenen:** K. Depypere, Kortrijkstraat, 160.
- Millen (Tongeren):** L. Geukens, Langstraat.
- Mortsel:** H. Van Durme, Eggestraat, 21.
- Ronse:** « La Paca Stelo », lokaal « Concordia », Statiestraat.
- Thielt:** R. Plettinck, Kromwalstraat, 24-c.
- Wilrijk:** Daniel Mortelmans, Egied Segerslaan, 14.
- Astene:** M. Vanderlinden, Dorp, 54.
-
-

OSTENDO

HOTELO METROPOLE

Kerkstraat, 32

75 komfortaj ĉambroj kun fluanta akvo, varma kaj malvarma. Centra hejtado. Lifto. Aŭtomobilejo. Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

MODERAJ PREZOJ

S-ano Snykers havas la plej bonajn rekomendojn kaj persone direktadas.

« BREUGHEL »

SPIJS- en DRANKHUIS

Em. Jacquainlaan, 37, Brussel

Lekkere Dranken

Fame konata pro siaj bongustaj kaj malmultekostaj manĝoj

Ejo de N. E. L. E.

(Brusela grupo Esperantista)



Varbu Abonantojn kaj Anoncantojn !

Speciale rekomendita Restoracio

„ La Renommée ”

St. Baafsplaats, 3 — GENT — Tel. : 120.12

apud la Belfrido.

Estro VAN DER PLANCKEN persone direktas la kuirejon kaj prizorgos la festenon kaj lundan tagmanĝon de la
7a FLANDRA ESPERANTISTA KONGRESO
Huis aanbevolen door V. T. B.

« Presejo de l' Centro », Kipdorpevest, 26, Antwerpen.